# Ne estu koko, aliĝu jam al KKPS

La plej bona kuracilo kontraŭ post-Esperanto-renkontiĝa sindromo estas aliĝi al la sekva renkontiĝo. Sed povas esti malfacile elekti inter ĉiuj paskaj renkontiĝoj, aŭ ĉiuj someraj. Sed unu elekto ĉiam estas facila: de la **1-a ĝis la 3-a de novembro** veni Nederlanden por KKPS!

Ĉi-jare ni trovis eĉ pli malinteresan lokon ol pasintjare por organizi eĉ pli mojosan semajnfinon: **Bodegraven**. Laŭ diversaj konspiraj teorioj la urbeto ne ekzistas. Malgraŭ tio la loko troviĝas en bela verda kamparo inter lagetoj kaj riveretoj.




*Ĉu tio ĉi estas Bodegraven?*



*Tiu ĉi foto estas prenita antaŭ la freneza festado.*


En KKPS kiel tradicie estos halovena balo, koncerto kaj ekskurso. Dumtage estos diversaj prezentoj kaj kursoj, kaj dumnokte estos trinkejo kun akoholaĵoj kaj fritaĵoj.



Pliajn informojn vi trovos en nia retpaĝo:

kkps.esperanto-jongeren.nl

Trovu tie kiel alveni, kiel foriri, kiel aliĝi, kiom pagi, kaj kiuj mojosuloj jam aliĝis.



# Pos-Amiko

**Printempo 2019, Numero 28**

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## INDEKSO:

1. Kiu respondecas en TEJO?
1. UEA ricevas helpon de ekstere
2. Nova nederlanda renkontiĝo
2. Karavano el IJF revenas
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

## Kiu respondecas en TEJO?

Antaŭ naŭ monatoj la Pos-Amiko raportis, ke la TEJO-estraro celas ĉiumonate renovigi la estraron. Tiu strategio evidente sukcesas, kun unu eksigita, unu demisiinta kaj kelkaj malaperadantaj estraranoj. Ĉar TEJO nun ankaŭ havas pliajn volontulojn kaj oficistojn, ĉiuj kun malsamaj laborkontraktoj, kaj pli da komisionoj ol interesgrupoj ol antaŭe, neniu en TEJO certas, kiu respondecas pri kio en ajna momento. Al la estrarkunsido akcidente estis invititaj la malĝustaj homoj. Iu aktivulo sendis demandon pri sapo, kaj post kvar plusendoj ŝi ricevis ĝin, ĉar fakte ŝi devus esti la koncerna respondeculo! Alia juna membro demandis al la TEJO-oficejo, al kiu peti repagon, kaj ricevis dek malsamajn respondojn de dek malsamaj respondeculoj.

La TEJO-estraro jam preparas kontaktliston kaj retan sistemon por klarigi la situacion, sed ĝi unue bezonas ekscii, kiuj nun membras en la estraro por povi labori pri ĝi.

## UEA ricevas helpon de ekstere

Antaŭnelonge la Universala Esperanto-Asocio anoncis, ke ili kiel oficialan kalendaron uzos kaj reklamos la retejon Eventa Servo, kiu kreiĝis tute memstare. Per tio la asocio agnoskas, ke pli facilas atingi celon sen helpo de la estraro aŭ oficejo de UEA, kaj tio nun malfermas la pordon al pliaj eksterigoj de servoj.

## KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko

Granda monŝparo jam estus ne plu eldoni propran revuon, ĝian rolon povus preni Monato aŭ Pos-Amiko. Samtempe la funkcioj de la Jarlibro kaj la delegita reto povus esti transprenitaj de Pasporta Servo, la membroadministrado povas okazi per Amikumu, kaj la kreado de organizaj skandaloj povus anstataŭe okazi en la Civito. Tiam restus al UEA nur ĝiaj kernaj funkcioj: la Universala Kongreso kaj la kafopaŭzoj.

Sed eĉ estas imageble, ke UK plu okazu kiel matena programo de la IJK, kiam normale la programsalonoj malplenas. Finfine por la kafopaŭzoj (kaj malfermaj tagoj) eblus trovi spacon en la oficejo de E@I, kaj ili povus eĉ iĝi pli interesa per uzado de loka teo.

## Nova nederlanda renkontiĝo minacas KKPS-on

La Klaĉ-Kunveno Post-Somera longe havis monopolion en la nederlanda merkato, sed nun aperas alia mojosa renkontiĝo, kiu alcelas la saman merkaton. La tiel nomata 'Internacia Junulara Kongreso' ankaŭ celas junajn esperantistojn, kaj okazos nur kelkajn monatojn antaŭ KKPS.

Helpanto el la organiza teamo de KKPS anonime komentas: "Kiuj ili pensas, ke ili estas? Ni havas sep jarojn da sperto por perfektigi nian programon. Kaj tiu IJK simple kopias niajn sukcesajn ideojn, kiel nokta fritado kaj bicikla ekskurso. Mi ne komprenas, ke TEJO subtenas tion, kio minacas la lokan agadon." La IJK-teamo estis tro okupita pri reklami KKPS-on por respondi al niaj kontaktpetoj.

## Karavano el IJF en Kastel'sarda revenas

Post preskaŭ kvin jaroj la lastaj partoprenintoj de la Internacia Junulara Festivalo 2014 en Sardujo revenis al siaj domoj. La karavano originale devis daŭri du tagojn, sed kelkaj partoprenantoj akcidente eniris malĝustan buson kun rifuĝintoj resendataj. Post alveno en Libio kaj diversaj problemoj pro la enlanda milito la karavano provis atingi la IJK-on en Togolando, sed atingis Lomeon du tagojn malfrue.

Finfine la karavananoj sukcesis kaperi ŝipon, atingi Malton kaj poste eskapi el malliberejo, en momento kiam ĉiuj gardistoj spektis bruliĝantan katedralon sur televido. La karavanestro ofertas al ĉiuj vojaĝintoj dekprocentan rabaton por la sekva karavano por la neplanita malfruo.

# NEJ-Novaĵoj!

## Ĉu vi volas senpage iri al la IJK?

La Internaciaj Junularaj Kongresoj en Slovakujo kaj Nederlando bezonas volontulojn. Pro tio vi nun havas unikan ŝancon partopreni ambaŭ kongresojn malmultekostege: vi pagos nur vian vojaĝon al Slovakujo kaj tranokton kaj manĝojn en Nederlando. Tio estas speciale bona oportuno, se tiu ĉi estos via unua eksterlanda renkontiĝo: vi tuj ekkonos multajn junulojn, vi rapide lernos, kaj vi pagas malmulte. Ĉu vi interesiĝas, ĉu vi havas demandojn, aŭ ĉu vi tuj volas kandidatiĝi? Sendu retmesaĝon al esperantojongeren@gmail.com.

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Vi malkovras, ke pli plaĉas PEKO ol feko.

**Taŭro:** La plej bona maniero por eviti Paskon estas senĉese dormi dum tri tagoj.

**Ĝemeloj:** Via rekomendata harkoloro por majo estas helblua.

**Kankro:** Ili povos nenion pruvi kontraŭ vi.

**Leono:** Ĉu vi malŝatas senharigi gambojn? Provu salti trans kampfajro!

**Virgulino:** Post ovoserĉado vi ne plu estos.

**Pesilo:** Celu esti vegetarano almenaŭ 90% de la tempo.

**Skorpio:** Vi serĉas respondecan TEJO-estraranon kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Valer:** 90% da travivintaj skoltoj oni konsideru kiel sukceson.

**Sagitario:** Se via valizo tro plenas, pripensu iĝi nudisto.

**Kaprikorno:** Provu rompi ne pli ol unu gambon grimpante arbojn.

**Akvisto:** Vi renkontos ĉarman fremdulon en via ŝranko.

**Fiŝoj:** Ĉi-monate vi havos neniun kolizion.

**La kondiĉoj:**

- Vi povas ĉeesti de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭĝusto 2019 kaj de la 11-a ĝis la 18-a de julio 2020.
- Vi sufiĉe parolas (parolos) Esperanton por partopreni eksterlandan renkontiĝon.
- Vi pretas helpi almenaŭ duontempe kiel volontulo.

**La gajnoj:**

- Senpaga partopreno en IJK 2019 kun loĝado kaj manĝoj
- Senpaga partopreno en IJK 2020
Subteno por trovi vojaĝon al Slovakujo
- Esti parto de du entuziasmegaj internaciaj teamoj!

## Anonco

NEJ organizos la IJK-on 2020 en Someren. Vi verŝajne jam konkludis tion el la supra alvoko.